

AMEBRIETO

N-ro 170

町田エスペラント会

Esperanto-klubo de Maçida

Amuza Kunvenoのお知らせ

日 時：6月1日（土）13：30～16：45

場 所：町田市生涯学習センター 6F 学習室 3, 4

内 容：講演、歌、オカリナ演奏、ゲームなど

講演のテーマ “Mia mar ŝado la ŭ la vojo Tokajdo”

（「私の東海道ウォーク」）

今回のお客様は日本のエスペラント界では語学や会話において定評のある山川修一さんです。テーマは「東海道を歩く」です。日本においては物語や絵、お芝居などに表されているので身近なテーマです。わからない単語があってもなんとか理解できることもあるのではないのでしょうか。そしてこの会に参加された皆さんは9月に行われる合宿でフランス人の ges-roj Martine, Max との会話に役立たせることができるでしょう。

その確かな語学に基づくエスペラントでお話を聞くことができるのはまたとない素晴らしい機会です。皆様の参加をお待ちしています。

（山川さんは、「エスペラント」4月号に現在の日本で考えられる「最強のふたり」と紹介されているなかのおひとりです。）

★ 終了後、午後5時30分から食事会を行います。

場 所：シェ・プルミエ（ホテル町田ヴィラ1階）

費 用：4000円（ワンドリンク付）

参加を希望される方は事前にご連絡ください。（担当 永木）

2019年5月

エスペラントで話がしたい！

上農 百合子

昨年のザメンホフ祭に講師として石野良夫氏を招待したとき、(エスペラントで)どうすれば会話ができるようになるのか、という質問をしました。答えは文章を書くことです、というものでした。それに続けて「あなたが試しにやってみてはどうか」という提案を受けて、昨年 10 月から石野良夫さんの作文教室のグループに参加することになりました。

毎月 1 回、与えられたテーマに沿って 200 くらいの単語で文章を書くというものです。これまでに 4 つのテーマが出されました。石野さんの方針はエスペラント日本語辞典にある文例を参考にしながら、文章を作る、というものです。ですから、常に辞書を傍らにおいて、辞書の文例を調べながら書くことをこころがけました。

その中から 3 編を紹介します。

Kafejo 'Renoir' (La temo: Kafejo)

Oni vizitis kafejon kiel trinkejon, aŭ ripozejon dum iom da tempo. Do, mi raportos kiel mi utiligis kafejon.

Antaŭ 28 jaroj, kiam la esperantistoj, kiuj loĝis ĉirkaŭ la urbo 'Maçida', fondis la Esperantan klubon de Matida en la jaro 1990. Tiam kelkaj el la membroj laboris tage. Kaj tri personoj loĝis trans la limo de Tokio. Do, la membroj volis kunveni proksime de la stacio 'Maçida'. Tial Maçida-anoj serĉis lokon por babilo kaj lerni Esperanton ĉirkaŭe de la stacidomo Maçida de 'Odakju linio'. Ĝi estis la kafejo 'Renoir'. Iamaj junuloj tre bone konas ĝin. Tie la membroj lernis Esperanton kaj legis libron babilante en Esperanto. Ili ofte devojiĝis de la aferoj de Esperanto. Kaj la temoj de la partoprenantoj variis en Esperanto iomete, eventuale tute japane. S-ro TARAO, malnova esperantisto, malofte aperis en la kunveno, portante dancŝuojn. Li babilis zumkantante iom da tempo kaj bonhumore forlasis la kafejon.

Estis grave, ke la kafejo permesis resti dum 2,3 horojn al la vizitantoj. Se bona kafejo troviĝus en la urbo 'Maçida', la klubo de Maçida ne kunsidus regule. Tio estas agrabla memoro al mi, kvankam kafo estis malbongusta.

Nun la kafejo 'Renoir' malaperis en la komenco de 2000 jaroj pro la eksmoda stilo.

La parko Jakuŝi-ike (La temo: Libervole)

La parko Jakuŝi, situas proksime de mia loĝejo. Do, mi ofte vizitis ĝin por malstreĉi min post cerbumado aŭ distri min, ĉar ĝi troviĝas nun okcent metrojn for de mia hejmo. La parko 'Jakuŝi-ike' estas ĉirkaŭitaj de du montetoj, kaj troviĝas la lageto 'Jakuŝi' sur la fundo de la montetoj. En frua printempo floras floroj de umeo. Sinsekve floras monto-sakuroj, iridoj kaj hidrangeoj en frua somero, poste lotusoj. En aŭtuno oni ĝuas koloriĝintajn foliojn. La plej vidinda arbo estas ginko, kiu staras antaŭ la sanktejo 'Jakuŝi-do', kaj imponas al ni,

vizitantoj per siaj dika trunko kaj larĝe etenditaj branĉoj, kaj ĝia alteco estas dudek metroj kaj havas jam grandan aĝon. Oni elektis la parkon kiel unu el cent-vidindaĵoj en la gubernio Tokio .

Lastatempe mi ne havis ŝancon viziti ĝin pro aferoj pri Esperanto dum almenaŭ kvin jaroj. Kiam mi legis blogon pri la parko kaj la ginko de mia ekskolegino, al mi venis ideo viziti la parkon. La parko estis kovrita de fruvintera etoso kun folioj brunkoloraj kaj estis tute kvieta.

Revenvoje mi rimarkis ŝildon pri anonco por pligrandigi la parkon. Kaj la tereno estis jam nuda. La aŭtoritatoj de la urbo Matida plenumos ĝin per seniigo de arbustoj, kverkoj, pinoj kaj diversaj herboj. Laŭ la ŝildo la parko ŝajne fariĝos arte aranĝita parko. Ĉar ĝi estas rande de la areo de medikonservado pri propraj arboj, inkluzive de la verdaĵoj en la kampo konsistanta de montetoj, mi esperas, ke la loko restos kiel antaŭe .

Sakuro (La temo: Lernejo)

Mi havas tre feliĉan memoron pri floroj de sakuro. Ĝi ankoraŭ restas en mia koro. Kiam mia plej juna filo rajtis eniri en bazan lernejon, li kaj mi ĉeestis en la ceremonio de la lernejo. Tiam plenfloris sakuro, kaj la kelkaj petaloj falis sur nin.

En la tago kiam okazas enirceremonio en lernejo, oni vidas tian novaĵon aŭ enĵurnala rubriko aŭ en televida programero ĉiam kun floroj de sakuro. Laŭ mia scio en multaj aŭ preskaŭ ĉiuj lernejoj oni trovas kelkajn sakurojn. Kial ili troviĝas en lernejoj? Ju pli malnove estis konstruitaj lernejoj, des pli aĝajn kaj grandajn sakurojn ili havas.

Intertempe mi sciis, ke antaŭa aŭtoritato plantis la sakurojn en lernejoj kun certa celo. Planti sakuron en lernejon datiĝas de antaŭ la Dua Mondmilito. Kaj ŝajnas ke la kialoj dependis de la specifa karaktero de sakuro. Sakuro floras admirinde, samtempe kaj tuj post la ekfloro petaloj de sakuro falas ŝvebante en aero. La sceno tre plaĉas al la aŭtoritato. Tiu vidis en sakuro decidan kaj bravan figuron. Iufoje la petaloj falas dancante kun blovo de vento sur surfacon de akvo. Kaj Japanoj trovas tian scenon tre ĉarma. Do, ili plantis la arbojn en lernejojn, dezirinte, ke geknaboj estu bravaj gejunuloj, kiel sakuroj. Tial oni vidas tre belajn sakurojn en la lernejoj.

Rigardante florojn kun granda admiro, Japanoj nun ĝuas alvenon de printempo.



Jam de ok jaroj mi apartenas al la Esperanto-Sumoo en la grupo ‘NurEsperanta Kunvivado’. Komence mi ne havis certan celon. Do, mi elektis legaĵojn arbitre, ekzemple artikolojn el esperantaj gazetoj aŭ librojn originalajn de aktivaj Esperanto-verkistoj. Intertempe mi rimarkis, ke legado alportas plezuron koni novajn esperantajn vortojn kaj sciojn pri sciencoj, ĉefe esprimoj en Esperanto kaj historiaj aferoj. De tiam mi planis legi romanon tra la tuta jaro.

En 2017 mi legis la libron ‘Zamenhof’ omaĝe al la centjara jubileo de la forpaso de Zamenhof, kiun Marjorie BOULTON verkis. Kiam mi aŭskultis Esperanto-novaĵojn pere de Pola Radio, mi hazarde sciis pri la forpaso de Marjorie BOULTON. Ĝi estas ankoraŭ nun freŝa en mia memoro. La drasta okazaĵo stimulis mian legadon. Tial mi traserĉis bonan libron de la listo pri la Esperanto-Sumoo de NEK aŭ en libroservo. Finfine mi trovis bonan libron en la Zamenhofa festo, Tokio en 2016. La libro estis ‘Quo vadis’. Tiam mi ne supozis, ke ĝi donos al mi grandan ĝojon kaj inspiron de fremda verkaĵo. En ĝi mi trovis tre lerte tradukitajn frazojn kaj utilajn vortojn por lerni esprimon de Esperanto. Mi konvinkiĝis, ke la tradukintino, Lidja Zamenhof estis talenta kaj kompetenta esperantistino. Ekzemple, kiam mi renkontis la frazon ‘Quo vadis, Domine? (Kien vi iras, Sinjoro!)’ en la lastaj paĝoj, trafulmis mian kapon iu ekscito. Tio estis ekstaza emocio, kiun donis al mi la plej juna filino de L.L.Zamenhof. Se vi demandas, kia emocio okazis al mi, mi rekomendas legi ĝin al vi.

Mi faros la defion per la libro ‘Ĉe akvorando’(ĉina verkaĵo ‘水滸伝’) en 2019.

編集後記 :

国内外の政治経済軍事や自然環境でかなり危険な状況が迫っているようです。しかし正しい情報があれば対策の立つものもかなりあります。日本のテレビや新聞が大事なことを報道しないのでインターネットで情報を集めています。もちろん間違った情報やフェイクニュースも多いのでいくつもの情報を比較検討しています。私の代表的な情報源は河添恵子:中国、三明貴明:経済、丸谷元人:国際政治の裏側、武田邦彦:温暖化寒冷化その他色々、及川幸久:米国、馬淵睦夫:日本と外国。また預金封鎖、火山、地震の情報も大事です。大体はYouTubeの動画で無料で見られます。(早川)

追記 : 2019年7月号の原稿は永木さん宛に送付してください。